ELDONANTOJ:
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio).
W. M. Page, adv., Edinburgh.
E. Archdeacon, Paris.
Joan Gili Norta, Barcelona
Teo Jung, Köln (Kolonjo).
G. van Heek, Hengelo.
Frans Schoofs, Antwerpen.
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno).

Ĉef-redaktoro: Teo Jung.
Kun-redaktoro: M. Butin.
Literatura redaktoro: Zanoni.

ESPERANTO
★ TRIUMFONTA ★

ADMINISTREJO:
Köln-Horrem, Rejnlando, Germanio.
Germ. poŝtĉeka konto 70865, por Teo Jung, Köln-Horrem.

Manuskriptojn oni skribu nur sur unu flanko de l' papero. Skribu ĉion legeble, se eble per maŝino. Por resendo aŭ respondo aldonu resp.-kup. aŭ poŝtmk. Adresu ĉion al s-o Teo Jung, Köln-Horrem, Germanio.

ABONEJOJ
ekzistas en multaj landoj. Vidu la liston de la Abonejoj sur la anonca paĝo. — En multaj lokoj ET estas poekzemplere aĉetebla ĉe stacidomoj kaj aliaj publikaj gazet- kaj libro-vendejoj kaj en grupoj. Dum vojaĝo oni postulu ET en ĉiu stacidoma gazet-vendejo, hotelo, kafejo kaj restoracio.
Komercaj ĉambroj favoraj al Esperanto abonas ET senpage ĉe la administrejo per oficiala letero. — Bibliotekoj, legejoj, redakcioj, aŭtoritatuloj (ne-Esperantistaj) povas ricevi ET pro propagandaj celoj por la duono de la abonprezo.

Aperas semajne. JARABONO: Aperas semajne.
3 dolaroj, 7 50 guldenoj, 12 svedaj kronoj, 15 svisaj frankoj, 15 ŝilingoj, 15 danaj aŭ norvegaj kronoj, 15 pesetoj, 25 francaj aŭ belgaj frankoj, 35 liroj, 60 finnaj markoj, 75 ĉsl. kronoj, 360 hung. kronoj, 1200 aŭstr. kronoj, 1600 pol. markoj. — Ĉiu pagas en la valuto de sia propra lando per naciaj bankbiletoj en rekomendita letero, aŭ per germanaj bankbiletoj aŭ ĉekoj sur germanaj bankoj laŭ la taga kurzo. — Balkanaj kaj baltaj ŝtatoj pagu 100 germ. mk., Rusio 50 gmk. Aliaj landoj pagu per dolaroj aŭ ŝilingoj, aŭ 100 respond-kuponoj aŭ 400 germanaj markoj. — Ne estas necese pagi tutan jarabonon je unu fojo. Oni sendu laŭvole altan sumon, kaj ni liveros tiom da numeroj, por kiom valoras la pago. Abonantoj, kies abono estas finiĝonta, ricevas ĝustatempe admonilon. — Abonoj povas esti komencataj per iu ajn numero — Germanoj abonu ĉe la poŝto (Postzeitungsliste, 13. Nachtrag, Ergänzungsheft 3, paĝo 280, sub „Kunstsprachen"), kvaroniare 21 mk., aŭ rekte ĉe la administrejo Köln Horrem, Germanio (ĉiu numero banderolita 2,— mk.).

ANONCOJ
kostas po cm² (kvadratcentimetro) por ĉiuj landoj 3 gmk., ĉe grandaj aŭ ripetataj anoncoj granda rabato. — ANONCETOJ kostas po 2 foja enpreso kaj po 25 vortoj por bonvalutaj landoj (ankaŭ Italio kaj Finnlando) la prezon de 4 n-oj de ET (1/12 jarabono aŭ 4 stampitaj respond-kuponoj); por malbonvalutaj landoj la prezon de 6 n-oj de ET (1/8 jarabono); 1 foja enpreso kostas la samon kiel 2 foja; ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la pagon por anoncetoj de la abonkonto. — Familiaj anoncetoj (naskiĝo, fianĉiĝo ktp.) kaj anoncetoj pri gravaj esp. okazontaĵoj (ĉefkunsido, fondiĝfesto ktp.) estas unufoje enpresataj senpage.

Numero 64 :-: Edinburgh, Paris, Barcelona, Köln, Hengelo, Antwerpen, Warszawa, Kaunas :-: 25. Dez. 1921.

Je Kristnasko 1921

ne forgesu vian blindan gesamideanaron!

Kristnasko estas festo de ĝojo, festo de donacoj. Donacu ankaŭ vi malgrandan sumon por „Esperanta Ligilo". 100 legantoj de ET jam respondis al nia alvoko; pli ol 3500 legantoj ankoraŭ silentas. :-: Ne plu hezitu: Duoble donas, kiu tuj donas.

Historia Skizo
pri la Esperanta Movado inter Blinduloj 1901—1914.

Verkita de *W. Percy Merrick.*

I.

Estis Harald Thilander, blinda, surdeta, kripla junulo, loĝanta en Hejmo por Malfortikuloj en Stockholm, kiu unue perceptis, kiajn grandajn servojn Esperanto povas fari al la tuta blindularo.

Tio okazis en 1901, kiam nenia dulingva vortaro estis reliefe presita, tiel ke estis preskaŭ neeble por blindulo lerni ian lingvon krom la nacian. Thilander, kiu ĉiam revis pri internacia kunlaboro inter blinduloj por kontraŭstari komunajn malhelpaĵojn de vidmanko, estis jam dediĉinta naŭ jarojn al tasko terura — la kopiado reliefen de diktado de svedaj vortaroj de la angla, franca kaj germana lingvoj, — tamen post tiu laboro li nur havis unu ekzempleron de la libroj.

Sed Esperanto povus alporti novan epokon. Oni povus, sen tro grava elspezo, multobligi per presado la malgrandajn lernolibrojn kaj radikarojn bezonatajn de tiu simpla lingvo, por ke ĉiu blindulo povu lerni kaj uzi ĝin.

Jam en fino de 1901, laŭ s-o Cart, troviĝas aludo al tiu temo en la korespondado de Thilander kun f-ino Zabilon d'Her (s-ino Ranfaing). En tiu jaro li verkis propagandajn artikolojn por svedaj kaj anglaj revuoj, kaj influis la preparadon de gravega artikolo, kiun s-o Ahlberg publikigis en „Lingvo Internacia" (januaro 1902), kiu altiris la atenton de multaj bonkoraj Esperantistoj al la graveco de Esperanto por la blinduloj. Inter ĉi tiuj sin trovis d-ro Javal, d-ro Dor, kiu priparolis la aferon ĉe kelkaj porblindulaj kongresoj, pastro Richardson kaj frato Isidoro, kiuj tiel sukcese instruis la blindajn knabojn en la brusela blindulejo, kaj precipe s-o Cart, al kies konstanta, energia, praktika laboregado la blinduloj ŝuldas multe pli ol al iu alia.

En 1902, tre kuraĝigita de rektoro Boirac, kun kiu li rilatiĝis, Thilander fervorege propagandis inter blinduloj. Li faris per Esperanto tiajn servojn al ĉiuj siaj blindaj amikoj, ke ili konvinkiĝis pri ĝia utileco, kaj ili fariĝis rondeto de pioniroj en multaj landoj. Kelkaj el ili, nome f-ino Aston (Aŭstralio), s-o Macan (Praha), f-ino de Chalmot — s-ino Zapater — (Germanujo), kaj eble aliaj, eĉ hodiaŭ restas fervoraj kunhelpantoj. Thilander kaj liaj amikoj kune verkis artikolojn por blindulaj revuoj, kaj la rondeto konstante kreskis.

Pri la varbmaniero de Thilander mi trudas la rakonton de mia propra sperto. En junio 1902 mi sciigis lin, ke mi tre amis Folkloron, kaj multe deziris sciigojn pri svedaj popolrakontoj kaj kutimoj. Kvankam li povis tiam skribi eĉ bonegan anglan leteron, li tute ne fidis sian kapablon traduki anglen la bezonitajn informojn. Senprokraste li kopiis reliefen la anglan ŝlosilon kaj sendis ĝin al mi kun fasko da svedaj legendoj, kiujn li mem Esperantigis. Tio estis nekontraŭstarebla. Mi rapide lernis Esperanton kaj kun ĝojego legis la legendojn, kiuj, laŭ mia surprizo, estis tiel klare esprimitaj, tiel videble fidelaj al la originalo, ke mi povis kompreni eĉ delikatajn nuancojn pli bone ol per ia angla traduko. Jen nur unu ekzemplo de la komplezemo de nia kara Thilander.

II.

En 1902, prof. Théophile Cart, fame konata franca lingvisto, sin turnis al la blindula demando pro la okula malsano de sia fileto. Legante la jam priparolitan artikolon en „Lingvo Internacia", li decidis alporti sian plenan energion al la efektivigo de tiu nobla ideo. Li pasigis la septembran libertempon apud Lausanne kaj diktis Esperantan lernolibron al kelkaj junulinoj ĉe la „Asyle Recordon" Kuraĝigita de ilia fervoro kaj progresado, li tuj klopodis la aranĝon de la alfabeto Braille'a por Esperanto. Lia unua provo ne plaĉis al Thilander, kiu jam elpensis la nunan tre simplan adaptaĵon. Tiun s-o Cart kun la aprobo de siaj instruitoj kaj s-o Jean-Jacques Monnier el Ĝenevo tuj adoptis, kaj reveninte Parizon en oktobro, publikigis kiel „Reliefan Alfabeton elektitan de Internacia Komitato". Dum la sekvantaj monatoj li konatiĝis kun kelkaj alton atingintaj blindaj profesoroj en Parizo, s-o E. Guilbeau, profesoro en la plej fama franca blindullernejo, ges-oj Poittevin, la edzo blindulo, la edzino tre helpema pri preparado de lernolibraj tekstoj, s-o Couillard, kiu poste fariĝis reliefa Esperanta presisto en Amiens, kaj aliaj. Per ilia kunlaboro la manskribita lernolibraro estis baldaŭ pretigita. Ĝi konsistis el malgranda kvankam sufiĉe plena gramatiko kun ekzercaro kaj vortareto, tiel aranĝita, ke oni povas utiligi la Esperantan porcion por ia lingvo por eviti la elspezon de represado. Laŭ propaganda artikolo en „Le Louis Braille" (majo 1903) de s-o Guilbeau, la libro jam estis presigita kune kun la germana parto. La angla parto tuj sekvis.

Sed la plej grava demando, kiun s-o Cart devis klopodi, estis la kolekto de mono, ĉar la blindularo estas neriĉa, kvankam blinduloj bezonas pli da mono ol viduloj por subteni sin en la sama bonfarto. Tial estas necese peti helpon al bonkoraj viduloj, tasko, kiun la blinduloj mem tute malŝatas pro la kutima popola kunigo de blinduleco kun almozuleco. Sed la energio de s-o Cart superis ĉiun malhelpaĵon. La pariza grupo bonkore pagis la unuan eldonon de la lernolibro. Aliaj privataj bonkoruloj donacis, ofte plej malavare, kaj fine f-ino Zabilon d'Her, la bona feino de la movado, starigis loterion, kiu kun la helpo de ŝiaj amikoj de Lyon alportis pli ol du mil frankojn. Granda estis la laboro, sed grandega la ĝojego pri la rezulto! Ĝi ebligis al s-o Cart certigi la sukceson de la afero per la fondo de tutmonda gazeto, la sola ilo, per kiu la kunlaboro de ĉiuj nacianoj povus esti inspirata kaj daŭrigata. Certe, la „plena energio" de s-o Cart jam produktis preskaŭ neatenditan frukton!

III.

Esperanta Ligilo
(Lingvo Internacia por Blinduloj)
Direktoro Prof. Cart 12 Rue Soufflot, Paris.

Patronaro:

S-oj Falius (Hamburg)	Grienberger (Linz)
Guilbeau (Paris)	Landriani (Firenze)
Llado (Palma Mal')	Lutmer (Hagenau)
Mehrlisch (Berlin)	Merrick (Shepperton)
Monnier (Genève)	Thilander (Stockholm)

Presisto Eldonisto Prof. Couillard, Amiens, Franclando.

Abono por 1904: 3 fk. por ĉiu lando.

Jen mi transskribas la titolon kaj kovrilan rubrikon de la unuaj numeroj de nia karega reliefa ĵurnalo. Kun kia ĝojo kaj fervora intereso la „patronoj" kaj abonantoj malfermis ĉi tiujn kajeretojn kaj palpe legis la enhavon! Mi citu:

Numero-Enhavo,
Majo 1904.

1. Al niaj legantoj, Cart. 2. Grava Avizo, Guilbeau.
3. Esperanto kaj naturo, Thilander.
4. Tri blindulinoj, Caetano Coutinho.
5. Al la fratoj, Zamenhof. 6. Gramatikaĵo, Fruictier.
7. Kroniko, Cart. 8. Humoraĵo, Problemo.
9. La karaj braceletoj. 10. Historio de la blinduloj, Guilbeau.

Kun la tria, julia numero s-o Cart disdonis adresaron de la legantoj, por ke ili laŭvole interrilatiĝu. Tion li faris ankaŭ en 1906, 1908, kaj lastfoje en 1910, kiam

Ho ne permesu estingiĝi lumon
Per Esperanto kiu al ni venas!
Se vi nur donos malgrandet an sumon,
Ni maltimigos. Plue ja aperos „Ligilo" kara.

Samideanoj! Sen ruĝiĝ' de honto
Por nia lum' ni vin petegas arde.
Gazet' se nia vivos en la mondo,
Vin ĉiam dankos gaja legantar' de „Ligilo" kara.

li aldonis tre gravan antaŭparolon kun historiaj notoj, el kiuj mi elĉerpis la plej interesajn partojn de ĉi tiu skizeto.

IV.

La multefara homo, kiu timtremaŝ je la frapo de la leterportisto alportanta pli da laboro, ol la ordinara persono povas plenumi, tute ne povas kompreni la senton de esploro, kiu igas izolan blindulon sin turni al nekonata fremda samsortano por iom da konsilo aŭ por intelekta refreŝigo. Kiel zorge oni ellaboras la unuan eksterlandan leteron, kiel ekscite oni atendas la respondon! Ĉu vere mi, bohemo, franco, anglo povas korespondi kun sudamerikano, italo, ruso, aŭstraliano? Jes, certe; ĉar eĉ la unua adresaro enhavis loĝantojn el ĉiuj ĉi landoj! Ĉiam la rondo kreskis kaj disvastiĝis en novajn landojn: cent, ducent, tricent, ĝis en la 1913-a jarlibro eldonata de Thilander troviĝas pli ol okcent blindaj Esperantistoj el dudek nacioj. Kelkaj el la legantoj konfesis al mi, kiam en 1914 mi pretigis tezon por la Porblindula Konferenco en Londono, ke ili preskaŭ vivas nur por la korespondado kun alilandaj amikoj.

Sed ni revenu al „Esperanta Ligilo". S-o Cart elektis tre interesan kaj bonan legajon. Li aldonis kiel felietonojn bonstilajn verketojn, kiuj finiĝintaj estis pretaj por konservado.

Dum naŭ jaroj s-o Cart laboris kiel direktoro kaj redaktoro de „Ligilo." Ĉiam li estas la sama fervora, komplezema, bonhumora, energia kuraĝigulo! Komence, ses numeroj aperis en la jaro, sed kun pli granda legantaro dek numeroj estis publikigataj dum la tria kaj postaj jaroj. Maltimigitaj de la ekzemplo de Guilbeau kaj Thilander, aliaj blindaj legantoj verkis raportojn, kronikojn, poemetojn, kaj fieriĝis, kiam ili estis akceptitaj kaj presitaj.

V.

S-o Cart verkis raportojn pri la internaciaj Kongresoj, kaj donis la plenajn tekstojn de la paroladoj de d-ro Zamenhof en Boulogne, Cambridge, kaj aliaj. En Ĝenevo, dum la Dua, li proponis, ke oni venigu blindulojn al la kongresoj, kaj per siaj tutaj fortoj kolektis monon por tiu celo. Tial oni vidis en Cambridge pli ol dudek kvin blindulojn el sep landoj. Eĉ venis Thilander kaj f-ino Karin Höjer (nun s-ino Thilander) el Svedujo, Macan el Bohemujo, kaj tri usonanoj. Kelkaj sindonemaj francinoj prizorgis la kondukadon de la plimulto de la blindaj kongresanoj, kaj la afero estis grandega sukceso. Kompreneble la „Ligilo" ludis grandan rolon en la preparado kaj aranĝado de la kunveno, kaj la sprita, bonhumora raporto pri ĝi, kiun s-o Cart verkis por la ĵurnaleto (oktobra kaj sekvantaj numeroj) detale revokas la ĝojan semajnon al la memoro de la ĉeestintoj. Oni babilis, ŝercis, interŝanĝis sciigojn pri la heima vivo kaj okupado, pri edukado. Oni ludis muzikon kaj kantis naciajn kaj Esperantajn kantojn. Oni parolis kun multaj personoj el diversaj landoj — kaj, ho ĝojo neatendita!, oni premis la manon de la kara Majstro mem, Zamenhof, la elpensinto de la lingvo, al kiu ili tiom ŝuldas! Mi dubas, ĉu sub la preteksto tiom da diversnaciaj blinduloj iam antaŭe kunveniĝis. Certe nenia grupo da kunvenintoj pli ĝuis la kuneston.

Espriminte la sentojn de siaj kunuloj, s-o Paul Ketterer, parolante en unu el la kongresaj kunvenoj, diris: „Esperanto estas la plej granda progreso efektivigita por ni blinduloj dum tiuj lastaj jaroj. Lernado kaj sciigo de Esperanto plilarĝigas nian horizonton kaj permesas al ni partopreni pli plene je la ĝenerala vivo de la homa societo . . . Esperanto estas nia kondukanto kaj espero."

Post la Cambridge'a, blinduloj ĉeestis preskaŭ ĉiun Internacian Kongreson. Estis naŭ en la Dresden'a, deksep en la Antverpen'a, kie ili faris muzikon kaj gajigis siajn vidantajn amikojn. Kelkaj en la Bern'a, kie ili prizorgis la peton por internacia poŝtrabato por blindula literaturo, kaj mi ne scias, kiom nombre en la Paris'a, kie niaj francaj amikoj pro la giganta laboro de s-o Cart estis aranĝintaj grandegan kunvenon de blinduloj kun la plej malavara gastemeco por la alilanduloj.

En la Krakow'a kongreso s-o Prezenti Levy transdonis al d-ro Zamenhof fotografajon de Ŝia Reĝina Moŝto Elizabet de Rumanujo kaj poste parolis pri siaj samsortanoj, montrante per ekzemploj la grandegan utilon, kiun ili tiris el Esperanto.

El la vojaĝoj de blinduloj efektivigitaj per Esperanto, la plej rimarkinda estas tiu de s-o Eroŝenko, juna rusa muzikisto, kiu en februaro 1912 ekiris el Moskvo kaj atingis London'on. Li veturis fervoje kaj ĉe ĉiu stacidomo, kie li devis eliri el la vagonaro, li estis renkontata kaj kondukata de UEA-delegito de la urbo. Mi kredas, ke la ĉefa organizantino de lia vojaĝo estis s-ino Ŝarapof. En Köln li estis renkontata kaj gastigata de ges-oj Zapater, blindaj geedzoj. En London li estis akceptata de la ges-oj Blaise, kun kiuj li gaste restis unu semajnon. Tiam s-o Phillimore, treege sindonema amiko de la blinduloj, prizorgis lin kiel patro. Li trovis por Eroŝenko loĝejon apud sia domo, promenis kun li, instruis al li la anglan lingvon, de kiu li komprenis neniun vorton, kaj fine kondukis lin al la fama Kolegio por Blinduloj en Norwood, kie la estrino, Lady Campbell, akceptis lin kiel lernanton en la sekvinta majo. Tie li restis ĝis la aŭgusta libertempo, kiam s-o Phillimore denove prizorgis lian bonfarton, ĝis li revenis Rusujon ŝipe en septembro. Poste li vojaĝis al Japanujo, al Burmah, ĉie propagandante Esperanton inter blinduloj kaj viduloj.

En la Antwerpen'a Kongreso s-o Phillimore renkontis alian blindan vojaĝanton, s-on John Bergh, el Finnlando, kiu ankaŭ venis Anglujon en la fino de 1911 por studi la anglan lingvon. Tre bonkore s-o Phillimore prizorgis lin dum lia restado en London. Tiel bone progresis lia studo de la angla lingvo, ke post okmonata restado en la lando li konkuris por literatura premio en la angla blindula revuo „Progress" kaj atingis „Honoran Mencion". Bergh estas fame konata finna aŭtoro, kies romanoj estas tradukitaj en multajn lingvojn.

Mi ne rajtas trudi miajn spertojn pri vojaĝado kun Esperantistoj kaj pri la ĝojo, kiun ili donis al mi, sed la memoro pri la landoj, kiujn mi vizitis kun s-o A. J. Adams (senĉesa laboranto por aliuloj, precipe por blinduloj) ĉiam restos viva. Dum tiuj ekskursoj alilanden — al Tirolio en 1910, al Antwerpen 1911, al Bern 1913, kaj alien, mi konatiĝis kun multaj bonkoraj Esperantistoj, s-oj H. B. Mudie, Bicknell, Joseph Rhodes, kaj aliaj, kiuj treege helpis la movadon inter blinduloj. Dufoje ni vizitis Bruxelles'on kaj miris pri la lerta parolado de la lernantoj de frato Isidoro en la Reĝa Instituto apude, kaj pri la bonkora laboro de nia bedaŭrata frato kiel reliefpresisto! Ŝajnis, ke la tuta lernantaro, eble centkvindek knaboj, povis bone babiladi en Esperanto!

VI.

Ĉar anoncoj en „Ligilo" atingas la tutan blindan Esperantistaron, aliaj reliefpresistoj de tempo al tempo povis eldoni Esperantajn librojn. Ĉefe el tiuj estis Thilander, kiu elirinte el la hejmo ricevis okupadon ĉe la Sveda Nacia Biblioteko por Blinduloj. Tie li progresis pro sia lerteco kaj neordinara laborvolo, ĝis li fariĝis redaktoro de sveda ĉiusemajna gazeto blindula. Li eldonis bonegajn svedajn lernolibron kaj vortarojn por Esperanto. Ankaŭ li presis literaturajojn kiel „Blinda Rozo" (Conscience), kantojn kun muziko kaj Esperanta teksto de f-ino Höjer, kaj la Esperanto-Anglan Vortaron de Motteau. Poste li eldonis la grandegan Esperantan vortaron de Joseph Rhodes, verkon, kiu okupas reliefe dekkvin grandajn kajerojn, kaj estas treege utila al blinduloj studantaj la anglan lingvon per Esperanto. En Germanujo oni eldonis bonegan lernolibron de Borel, kaj nun aperigas valoran vortaron. En Bruxelles frato Isidoro eldonis lernolibrojn por flandroj kaj kelkajn literaturajojn. En Lausanne Paul Ketterer eldonis Esperantajn librojn por blinduloj. En Anglujo la Nacia Instituto por Blinduloj eldonis per donacoj la unuan parton de „Unua Legolibro de Kabe" kaj memelspeze la lernolibron de H. Fryer. En Francujo, krom la presajoj de s-o Cart, s-ino Bastoul multobliĝis per la ilaro Vaughan la zamenhofan tradukon de „Marta" k. a. S-oj Imsdahl (Norvegujo), Wulff (Danujo), Linares (Hispanujo) ankaŭ presigis tre utilajn lernolibrojn.

Kelkaj bibliotekoj porblindulaj havas mane skribitajn librojn Esperantajn krom la presitaj. Jam en 1910, ĉefe pro la varbado de s-o A. J. Adams, sindonemaj Esperantistoj komencis kopii Esperantajn librojn por blinduloj, kaj hodiaŭ troviĝas en la Nacia Biblioteko por Blinduloj pli ol kvincent volumoj. Koregajn dankojn ni ŝuldas al la dekduo da kopiantoj, kiuj dediĉas tiom da tempo senpage al tiu laboro! Ĉiuj blinduloj povas pruntepreni tiujn librojn, pagante nur la poŝtkoston, kiu ne estas alta pro la ĵus 1921 efektivigita poŝtrabato internacia por blindulaj literaturaĵoj.

VII.

Sed denove ni revenu al nia kara „Ligilo". En 1912 s-o Thilander petis permeson aldoni du „Libertempajn Numerojn" al la dek eldonitaj de s-o Cart. Tion s-o Cart plene aprobis. La du numeroj estis precipe dediĉitaj al blindulaj demandoj, kal tiel plaĉis al s-o Cart, ke li petis al Thilander, ke li fariĝu redaktoro kaj eldonisto. Thilander entreprenis la taskon kaj daŭrigis „Fakajn Numerojn" ĝis la fino de la jaro, kaj en 1913 surŝultrigis la tutan respondecon pri la ĵurnalo. Tamen, s-o Cart daŭrigis siajn ĉiumonatajn leterojn al siaj blindaj amikoj kaj alimaniere multe helpis.

Sub Thilander la „Ligilo" pli kaj pli grandiĝis kaj disvastiĝis. Lia vasta konatularo — tiu vorto signifas „amikaro" koncerne lin — kuraĝis sciigi lin pri ĉio rilate al blindulaj aferoj. Unu leganto starigis ŝakpaĝon, aliaj klopodis universalajn notadojn por muziko, matematiko. Aliaj priskribis novajn ilojn metiajn, ĉiuspecajn eltrovaĵojn porblindulajn. Per korespondado oni interŝanĝis valorajn spertojn. Lokon li ankaŭ trovis por bonaj literaturaĵoj: artikoloj, romanetoj, poemoj. Inter la kunhelpantoj troviĝis redaktoroj de naciaj blindulaj gazetoj, kiel Imsdahl kaj Wulff, kaj aliaj tro multaj por nomi. Estis Thilander, kiu trovis riĉan, malavaran svedan subtenfonton.

Neniu povas scii, per kiaj heroaj laboroj Thilander kaj lia edzino daŭrigis la „Ligilon" ĝis oktobro 1916! Nur tiam, kun preskaŭ rompitaj koroj, ili cedis al la tiamaj malfacilaĵoj. Dum du jaroj „Ligilo" ne aperis, ne ĝojigis la suferantajn blindulojn! Tamen, ili poste restarigis ĝin, plibonigis ĝin!

Restas al ni, ho tutmondaj Esperantistoj, subteni ĝin kiel efikan atestaĵon pri la bonfaremo de Esperanto!

W. P. Merrick.

(Rim. de Red.: Pri la Esperanta movado inter blinduloj post la milito bonvolu legi en ET n-o 57.)



Blinda hispana virtuozo Baldomero Zapater kun sia nederlanda edzino, nask. de Chalmot, kiuj edziĝis per Esperanto.

S-o Zapater laŭ nia peto skribis al ni pri la influo de Esperanto al sia vivo:

Mi naskiĝis en Caudiel, vilaĝo en provinco Castellon de la Plana, Valencia (Hisp.), 1. marto 1883 kaj blindiĝis en mia kvara vivjaro. Kaŭze de tio miaj gepatroj transloĝis Barcelona'n, kie troviĝas bonaj okulistoj kaj blinduledukejo. En tiu ĉi mi faris miajn studojn, t. e. Braille-skribado kaj -legado, elementa instruo kaj muziko kiel estonta profesio. Mi specialiĝis en gitaro kaj sukcesis fariĝi mondkonata virtuozo.

Tion mi ŝuldas grandparte al Esperanto, ĉar sen tiu ĉi lingvo mi sendube malgraŭ miaj muzikaj kapablo estus restinta nekonata ekster Barcelona. Feliĉe per s-o Sabadell el Barcelona mi konatiĝis en la jaro 1907 kun Esperanto, kies lernado estis por mi tre facila, ĉar mi havis bonan lernejinstruon.

Jam en 1909 mi konatiĝis kun holanda samideanino, f-ino de Chalmot, kiu partoprenis la Esperantistan kongreson en Barcelona. El tiu ĉi konatiĝo rezultis nia edziĝo. Ĉar ŝi loĝis en Köln kaj, ĉar la gitararto en Germanio estas en stato de evoluado, ni decidis transloĝi tien.

Mi ne sciis unu vorton germanan, kaj mia edzino ankaŭ ne hispanan; tial al ni estis nur eble kunvivi per Esperanto. Per Esperanto ŝi ankaŭ instruis al mi la germanan lingvon; sed ankoraŭ hodiaŭ nia familia lingvo estas Esperanto.

Pluaj Donacoj

por „Esperanta Ligilo" alvenis de:

94. Laborista Grupo Essen 130 gmk. — 95. Esp. Eldonejo „Kultura", Budapest 30 hung. kr. — 96. Jan Nósek, Skrivany 15 kĉ. — 97. Pultr, Skrivany 10 kĉ. — 98.-101. S-oj Weinberg, Oulehla, Soukup kaj Grötz, ĉiuj en Skrivany, po 5 kĉ. — 102. Kolekto de Esp. Grupo Salzburg 2100 aŭstr. kr. — 103. Dimitr Simeonov, Sofia 20 gmk. — 104. Heinrich Vogel, Breslau 10 gmk. — 105. Max Urban, blindul-instruisto, Frankfurt a. M. 20 gmk. — 106. A. Couto Fernandes, Rio de Janeiro 1 milrejso. — 107. Ks. Alfus, Tarnow 10 gmk. — 108. Membroj de Esp. Grupo „Godea", Godesberg 35 gmk. — 109. Esp. Grupo Stolberg 50 gmk.

Korekto.

En la artikolon „La Voko de l' Nordo" en ET n-o 59 bedaŭrinde enŝoviĝis du preseraroj en la nomoj de lokoj, nome, en 3-a kolono, 9-a linio de malsupre devas esti „Kangasala" (anstataŭ „Rangasala"), kaj en 4-a kolono, 1-a linio supre, devas esti „Mankala" (anst. „Maukala"), kion almenaŭ la turismemuloj bonvolu noti.

Niaj novaj Abonkondiĉoj.

En novembro, kiam la enspezoj de ET la unuan fojon jam ĝojige superis la elspezojn pro la alta eksterlanda valuto kaj la relative malaltaj prezoj en Germanio, ni neniel povis supozi, ke jam post unu monato la situacio tiom ŝanĝiĝos, ke ni estos devigataj plialtigi, por kelkaj malbonvalutaj landoj eĉ tre grave **plialtigi la abonprezojn**, por ke ET povu daŭrigi sian ekzistadon.

Kaŭzoj de la plialtigo estas: **pliboniĝo de la** germana valuto (per tio malpliboniĝo, en Germanio, de la eksterlandaj valutoj) kaj samtempa subita **duobliĝo**, parte eĉ **triobliĝo, de la kostoj** por materialo, salajroj kaj afranko. Do, du faktoj tute malaj, sed tiom pli fatalefikaj al nia entrepreno.

Krom tio komence de decembro la fondinto de ET metis la ĵurnalon sur propran komercan bazon, devis lui specialan kontoron, dungi specialan sekretarion kaj laboras mem jam nur por la redakcio kaj administracio de ET.

De 1. januaro la prezo de papero estos supozeble 0,45 gmk. (en novembro 0,15), de afranko eksterlanden supozeble 1 gmk. (ĝis nun 0,30) por ĉiu numero de ET; ankaŭ la ceteraj prezoj altiĝis resp. **altiĝos** laŭ simila mezuro tiel, ke estonte la eldono de ĉiu numero kostos al ni ĉ. 7500 gmk., t. e. laŭ nuna kurzo ĉ. 45 dolaroj, 11 sterlingaj pundoj ktp.

Ni nun fiksis la novajn prezojn tiaj, ke la abonantoj el plej malbonvalutaj landoj pagos almenaŭ la prezon por papero kaj afranko kaj alia parto pagos preskaŭ la kostojn por papero, afranko kaj preso, dum la kostojn por redakcio kaj administracio ni gajnos el la abonoj en landoj kun bona aŭ meza valuto.

Tio signifas, ke ni provizore rezignas je iu ajn gajno el la landoj kun malbona valuto kaj entute je iu ajn negoca profito, kiun ni tamen esperas por la estonta tempo per kompostioma pligrandiĝo de la abonantaro, precipe eĉ bonvalutaj landoj.

Se oni komparos niajn novajn abonprezojn kun la prezoj de aliaj, nur monataj, internaciaj Esperantaj kaj aliaj gazetoj, kiuj — same kiel ni — ne povas ekzisti per anoncoj sed devas vivi preskaŭ ekskluzive per abonoj, oni konfesos, ke niaj novaj prezoj estas nur iomete pli altaj ol tiuj de similaj, **monataj** organoj, kaj ke ili tial estas relative **tre malaltaj**, precipe se oni konsideras la nekutiman formaton, la regulan **ĉiusemajnan** aperadon kaj la per tio atingitan plejeble grandan aktualecon de ET.

La novajn prezojn oni bonvolu trovi sur la titola paĝo. La prezoj por la

Opa Vendado

estos: 0,06 dol.; 0,15 guld.; 0,25 sved. kr.; 0,30 svis. fk., dan. aŭ norv. kr., pes.; 4 pencoj; 0,50 fr. aŭ belg. fk.; 0,70 it. lir.; 1,20 fmk.; 1,50 kĉ.; 7,50 hung. kr.; 25 aŭstr. kr.; 35 pol. mk.: internacie 2 resp.-kup.; en Germanio, baltaj kaj balkanaj landoj 2 gmk.

La novaj kondiĉoj kaj prezoj validos de n-o 65 (1. jan. 1922).

Jam pagitaj abonoj estos ankoraŭ plenumataj por la malnova prezo.

Ni atentigas, ke pro la novaj abonprezoj ankaŭ

la Prezoj por Anoncetoj

altiĝos. Anoncetoj kostos de nun por 1 aŭ 2 foja enpreso po 25 vortoj por germanoj **12 mk.**, por poloj 210 mk., por hungaroj 45 kr., por francoj 2 fk. ktp., internacie 8 resp.-kup. aŭ 32 germ. mk.

Germanaj Abonantoj

abonas prefere ĉe sia poŝtoficejo. Abonprezo por januaro—marto 1922 nur 15 gmk., poste 21 gmk. kvaronjare. — Abonantoj, kiuj abonos rekte ĉe la administrejo de ET en Köln-Horrem, devas pagi por ĉiu numero 2 gmk.

Aŭstraj abonantoj

bonvolu aboni de nun nur ĉe s-o Ferd. P. Huber, Salzburg, Mönchsberg 5.

* * *

Abonejoj de ET

en la landoj

Aŭstra: Ferd. P. Huber, Mönchsberg 5, Salzburg.
Belga: Frans Schoofs, 45, Kl. Beerstraat, Antwerpen.
Bulgara: Georgi Ĥr. Gaŝevski, Bul. Marie Luiza 46, Sofia
Ĉeĥoslovaka: Otto Sklenĉka, Hradec Kralové. Otto Lumpe, Trautenau.
Estona: Est. Esp. Unuiĝo, postkast 6, Tallinn.
Finna: O/Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki.
Franca: Esp. Centra Librejo, 51 rue de Clichy, Paris 9.
Hispana: Konrado Doménech, Ĝerono, Rambla Alvarez 12-2.
Hungara: Paŭlo Balkanyi, Hajos-utca 15-II-2, Budapest VI
Litova: Paŭlo v. Medem, Smeliu g-ve 12, Kaunas (Kovno).
Pola: Adolfo Oberrotman, Krak-Przedm 10, Warszawa. (P. K. O. n-o 5125). — Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordeckiego 1 a, Bydgoszcz-Bromberg
Rumana: Andreo Ĉe, Cluj, Transsilvanio, Calea Victoriei 129.
Sveda: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1
U. Ŝ. A.: The Esperanto Service Corporation, 500 Fifth Avenue, New York City.

Abonantoj de ses ekzempleroj al unu adreso ricevas altan rabaton.

La grava venko en Finnlando.

Post la unua telegrafa sciigo ni ricevis la jenajn informojn pri la dua subvencio de 25000 fmk., jus donita de la finnlanda parlamento al Esperanto-Asocio de Finnlando:

Kiel oni scias, en printempo la parlamento enkondukis en la ŝtatan buĝeton de 1921 la sumon de 25000 mk. por subvencio al la Esperanto-Asocio de Finnlando. Kiam la vico venis al la buĝeto de 1922, la registaro mem jam proponis same grandan sumon; la buĝeta komisiono ĝin akceptis, kaj la 2. dec. la koncerna parto de la buĝeto estis pritraktata en plenkunsido de la parlamento. Naskiĝis subite longaj debatoj, inter kiuj estas speciale citindaj la parolado de prof. M. Svininen, ĉefdirektoro de la administracio por publika instruado, kiu varme subtenis proponon pri plialtigo de la sumo ĝis 50000 mk., kaj la efika eldiro de prof. R. Erich, jus estinta delegito de Finnlando ĉe la Ligo de Nacioj, kiu parolis kontraŭ divido de la sumo inter Esperanto kaj Ido, kiel iuj proponis. Okazis du balotoj. Unue inter la propono de la registaro kaj buĝeta komisiono pri 25000 mk. kaj tiu pri 50000 mk.: venkis la unua per 119 kontraŭ 55 voĉoj (sufiĉe grandnombra malplimulto!), pro ĝenerala ŝparemo. Due oni voĉdonis inter la propono de 25000 al Esperanto kaj tiu pri 35000 mk. al Esperanto kaj Ido po duone: la dua estis simple aklame forĵetata.

Estas interese noti, ke ĉi tiun fojon jam tute ne estas farita propono pri eljeto de la sumo el la buĝeto.

Pri la graveco de tiu ĉi nia venko ne povas esti iu dubo. Jam la fakto, ke la subteno estas donita jam duan fojon, estas grava fakto: estas ĝuste la daŭraj sukcesoj, kiujn ni pleje bezonas.

Kiel ajn ideala nia afero estas, ankaŭ ĝi ne povas disvolviĝi sen monrimedoj, kaj tial ni esperas, ke aliaj landoj baldaŭ sekvu kun similaj decidoj. La finnlandaj Esperantistoj volonte komunikos al la aliaj naciaj asocioj siajn spertojn pri la necesa antaŭagado, ĉar ili konscias, ke la afero devas progresi ne nur en kelkaj, sed en multaj landoj, por ke ni baldaŭ povu atingi la finan venkon.

Kiamaniere Esperanto utilas al Rusoj en la Sankta Lando.

En septembro 1920 s-o Paŭlo de Medem en Kovno (Litovio) ricevis el Palestina de s-o I. Muĉnik (konata Esperantisto) leteron, en kiu s-o Muĉnik petis la helpon de s-o de Medem, por ke li povu interkomunikiĝi kun siaj gepatroj kaj parencoj en Ruslando. S-o de M. plenumis la peton, kaj post kelka tempo li ricevis leterojn el Ruslando, kiujn li sendis al Palestina. Baldaŭ la korespondado fariĝis tre vigla, ĉar ne nur la parencoj de s-o Muĉnik sed multaj konatoj uzis la peradon de s-o de M. Fine alvenis jena kortuŝa dankletero al s-o de M.

Monto Kineret, 24. sept. 1921.

Altestimata sinjoro!

Ni Palestinoj Esperantistaj kaj „Esperantemaj" estis longan tempon, pro la milita stato de Eŭropo, deŝiritaj de niaj geparencoj en Rusujo, kaj malgraŭ ĉiuj niaj penoj ni neniel povis interrilati kun ili kaj sciiĝi pri ilia farto. Dank' al s-o I. Muĉnik ni feliĉe turnis nin al la helpo de Esperanto, kaj per via afabla komplezemo ni nun regule interkorespondas kun niaj karaj familioj kaj parencoj en Rusujo kaj Ukrainujo.

Ni sendas al vi ĉi tiun albumon de nia regiono kiel modestan sed sinceran dankon.

Kun granda plezuro ni povas konstati la grandajn utilojn, kiujn la lingvo internacia Esperanto povas alporti kaj kiu plej bone servas por la bono de l' homaro kiel rimedo de amikiĝo inter la popoloj.

Ni esperas, ke la Esperantismo faros plej bonajn sukcesojn en Palestina, la patrulo de de nia profeto Jesao, kiu antaŭdiris la tutmondan pacon sur ta tero.

Kun plej alta estimo:

E. Milrud	*M. Milrud*
A. Juni Vickius	*I. Gibes*
A. Schor	*S. Bergr*
B. Misonznik	*A. Nowosel*
A. Kaufman	*I. Muĉnik.*

(Rim. de Red.: Ni ne povas garantii la plenan aŭtentecon de la nomoj, ĉar ili estas malklare skribitaj.)

S-o de Medem informis nin, ke — en alia letero — s-o Muĉnik lin demandis, ĉu li volas partopreni en la eldonado de hebrea lernolibro de Esperanto. Ĉe tiu ĉi okazo ni mencias, kion skribis al ni antaŭ kelka tempo s-o d-ro Austerlitz en Bardiov, Ĉeĥoslovakio:

En n-o 40 de ET mi legis: „Ĉar ne ekzistas lernolibroj en hebrea lingvo . ." (Hebrea Esp. Grupo en Jonava, Litovio.) — Tiurilate mi rimarkas, ke inter miaj multaj diversaj Esperantaj lernolibroj troviĝas unu nomita „More sfas Esperanto" de D. Gureviĉ, aperinta 1909 en Odessa. La libreto estas 80-paĝa Esp.-hebrea lernolibro kaj ricevebla ĉe la aŭtoro Gureviĉ, Odessa, Ruslando, M. Arnaut 106. — Sur la unua paĝo troviĝas la teksto de letero, sendita la 14. sept. 1890 de la Majstro al la aŭtoro.

Eltrovaĵo de blinda elektroteknikisto.

Blinda elektroteknikisto, Henriko Nosek el Beroun apud Praha (Ĉeĥoslovakio), eltrovis aparaton malebligantan absolute ŝtelon de elektra energio de la konsuminto. Dum eksperimentoj faritaj antaŭ la fakuloj oni konstatis, ke la elektra lumo, aligita al la aparato, ĉesis tuj funkcii, kiam ekzemple la taŭga elektra lampeto estis anstataŭata per lampeto de pli forta lumebleco.



Blinda elekroteknikisto s-o Nosek en sia laborejo.
La fotografaĵo, laŭ kiu estas kliŝita la ilustraĵo, estas afable farita de s-o Chrisostom Schmidt, fotografisto en Beroun apud Praha.

La eltrovinto intencas utiligi sian eltrovaĵon tuj, kiam li gajnos necesan monsubtenon.

S-o Nosek perdis la vidkapablon sekve de iu malfeliĉa okazaĵo jam kiel kvarjara knabo. Malgraŭ tio li absolvis popolan kaj burĝan lernej-ekzamenon kun bonega sukceso. Li lernis parkeran kalkuladon, skribadon sur maŝino, kiun instituto de Klar (en Praha), donacis al la lernejo, legadon de blindulaj libroj, geografion, historion ktp. Kun speciala intereso li sekvis natursciencajn paroladojn, precipe pri elektraĵoj. Ĉiam post reveno el lernejo li faris tuj sukcesajn elektroteknikajn eksperimentojn. Post absolvo de la lernejo, li dediĉis sin plene al tiurilata studado. Lia patro havigis al li fakajn librojn, el kiuj oni laŭtlegis al la junulo. Kiel deksepjarulo li faris jam seneraran instaladon de domtelefonoj, elektraj sonoriloj ktp. Ĉe pluaj laboroj helpadis lin poste tre efike kaj sindoneme lia fidela edzino komprenanta bonege liajn interesojn.

Kiel okazas ofte al homoj tuŝitaj per malfeliĉo, eĉ nia Nosek estis ĉiuflanke malhelpata! Ĉar li ne posedis paperan kvalifikaĵon, oni malfavoris lian penon fariĝi konfidinda fakisto, sed fine li tamen sukcesis konvinki la dubulojn pri sia kapablo; li pruvis ĝin farinte fakan ekzamenon ĉe konataj ĉefurbaj elektroteknikaj entreprenoj. Tiam oni majstrigis lin.

Nun, kiam li fariĝis konata per multaj rimarkindaj eltrovaĵoj, kiel ekz. pliperfektigo de elektraj gladiloj kun ŝparo de elektra energio k. m. a., li renkontiĝos espereble ne plu kun malhelpaĵoj, sed kun helpantaj manoj kaj laŭmerita kompreno.

Recenzejo.

LIBROJ.

LA FORMORTINTA AMIKO. Teoria kaj praktika partopreno por pruvi la identecon de la spiritoj. Verkis Jules Thiébault. Tradukis E. Grosjean-Maupin, LK. Paris. Esp Centra Librejo, 51, rue de Clichy. 15½ : 24 cm. 32 pĝ.

La broŝuro certe interesos ĉiujn samideanojn sin okupantajn pri la scienca spiritismo; ĝi estas senpage sendota al psikistaj grupoj kaj al ĉiuj samideanoj, kiuj ĝin petos de la aŭtoro (s-o Jules Thiébault, avenue de Blagny, Carignan, Ardennes, Franc.) per ilustrita poŝtkarto surhavanta facil-legeblan adreson kaj nomon de la forsendinto. Speciale interesa estas fotografaĵo de spirito aldonita al la broŝuro.

FINNLAND. Formato 15½ : 23 cm, 112 pĝ. kaj kovrilo. Eldono de Foiroficejo Frankfurt a. M., Germ. Prezo ne montrita.

Tiu ĉi libro enhavas kolekton da germanlingvaj, verkitaj de finnoj artikoloj, kiuj pritraktas la finnlandan popolon kaj ekonomion kaj la interrilaton de Finnlando kaj Germanio. Kun granda intereso mi tralegis la libron, speciale bonvenan al Esperantistoj vizitontaj la XIV-an Kongreson de Esperanto en Helsinki. T. J.

EXPORT-ADRESSBUCH der deutschen Edelmetall-Industrie. Published by G. W. Gärtner, Verlags-G. m. b. H., Frankfurt a. M. 18½ : 24 cm, 120 pĝ. kaj kovrilo. Prezo por ne-anoncintoj 30 gmk.

Eksporta Adresaro de la germana industrio de delikataj metaloj. Tre grava por ĉiu komercisto de tiu ĉi branĉo.

GAZETOJ.

Amerika Esperantisto. Nov.
Bulgara Esperantisto. Nov.
Bizantio. Okt.
La interesa revuo el Konstantinopolo. Adreso: D-ro A Stamatiadis, rue Tépé Bachi 59, Péra, Konstantinopolo
Der Arbeiter-Esperantist (La Laborista Esperantisto). Dec.
Esperanto. Dec.
La 15. dec 1859. — Esperanto ĉe la Ligo de Nacioj. — Literaturo. — Esperantismo, ktp.
Kataluna Esperantisto. Nov.-dec.
Kun riĉe ilustrita raporto pri la X-a Kongreso de Kat. Esp. Fed. kaj pri la VIII-aj Internaciaj Floraj Ludoj.
La Espero. Nov.-dec.
Ni dankas pro la favorega mencio pri ET.
La Holanda Pioniro. Nov.
Post Novjaro ne plu aperos.
La Provo. Dec.
Corriere Balcanico-Esperantisto. 30. nov.
Esperantida. Dec.
Denove Antido deklaras la definitivan finiĝon de siaj priling vaj studoj. Tamen — laŭ nia opinio — li devus ankoraŭfoje iom ŝanĝi: li ankoraŭ ne tute solvis la problemon pri forigo de supersignoj, havante literon ŭ. Ni konsilas simple anstataŭigi ĝin per la litero w.
Suisian Idisto. Dec.

Propagandiloj ktp.

AFIŜETOJ el aluminio, 90 : 50 mm, kun verda stelo kaj vorto „Esperanto". 4 diversaj specoj: Esperanto parolata. Delegito de UEA, Membro de UEA, kaj Membro de GEA. La afiŝetoj estas plaĉe faritaj kaj tre praktikaj. Oni povas fiksi ilin sur la pordo. La prezo estas malkara: 10 ekz. po 2,60 gmk., 50 po 2,40, 100 po 2,20. Oni mendu ĉe Frib Mayerhauser, Bad Reichenhall, Germ.

MOKA (Mondjunularo Katolika), Centra Oficejo Graz, Aŭstr., Karmeliterpl. 5, eldonis bluajn varbilojn, 11½ : 15 cm.

Premi-Enigmo.

(La solvo estos publikata post unu-du monatoj. Solvintoj sendu samtempe kun la solvo minimume 1 fk. aŭ 10 gmk. por „Esperanta Ligilo". El la solvintoj kvin ricevos la belan memorlibreton „Lastaj Tagoj de D-ro Zamenhof", presitan sur luksa papero kaj riĉe ilustritan.)

a a aŭ co da do do do droŝ e gus hi hun i iŝ ke ko ko ko ko ko ko la lo lu lun me mo na ni ni o ri ri ri ro ro run ti to tu vo zo

Oni kunmetu la silabojn tiamaniere, ke rezultos jenaj 15 signifoj: 1. birdo, 2. kontinento, 3. ŝtonego, 4. monato, 5. virina antaŭnomo, 6. deklinacia kazo, 7. vestaĵo ĉe la antikvaj romanoj, 8. dombesto, 9. religio, 10. semajntago, 11. kanto, 12. metalo, 13. veturilo, 14. besto, 15. stilo.

La komencaj literoj de la 15 vortoj, legataj de supre al malsupre, nomas konatan blindan Esperantiston.

* * *

Solvo
de la Premi-Enigmo el n-o 57.

Erzerum
Santander
Pekin
Essen
Rio de Janeiro
Alger
Nancy
Toronto
Adelaide
Lima
Ismailia
Guatemala
Inverness
Lahore
Omdurman

La komencaj literoj formas la vortojn:
ESPERANTA LIGILO.

Alvenis tiom da ĝustaj solvoj samtempe kun sumeto por „Esperanta Ligilo", ke ni decidis duobligi la nombron de la premioj. La gajnintoj de la premioj estas destinitaj per loto:

1. Gabriëls, Rotterdam, Diergaardelaan 64.
2. Ch. Brunet, Bordeaux, 59 cours Victor-Hugo.
3. Toni Simon, Magdeburg, Karlstr. 6.
4. Vaclav Ĉansky, Nusle 5.
5. Carlo Gilá, Locarno.
6. H. van Doninck, Antwerpen, Duboisstr. 57.

La premiitoj ricevos je Kristnasko po unu ekzempleron de „Lastaj Tagoj de D-ro Zamenhof".

Posttagmezo en Paradizo.

Serioza humoraĵo.

Tuj post kiam mi subite estis mortinta, mia Animo leviĝis ĉielen. Pri ĉi tiu vojaĝo mi nenion konscias, ĉar ĝi okazis tiel rapide, ke dumvoje oni absolute nenion rimarkis, nur senpere antaŭ la pordo de l' paradizo mi reakiris mian plenan intelekton. La unua aĵo, kiun mi ekvidis, estis granda verda stelo kvinradia, brilanta super la ĉiela Enirejo.

Mi ne miris, pri nenio mi miris. Ĉio ŝajnis al mi tute laŭnatura kaj komprenebla. Pro la Verda Stelo mi nur konstatis interne, ke la ĉiela enloĝantaro estas pli progresema ol la surtera, kaj pri mia destino mi rezonis, ke malgraŭ diversaj peketoj mi tamen estas sufiĉe bonkaraktera homo, neniam ion ŝtelinta kaj krom tio Esperantisto, kiu kvalito jam sen ĉio alia meritas ĉielon. Sed mi ne deflankiĝu kaj rakontu laŭorde, kion mi travivis.

Sub la Eden'a Pordego akceptis min dejoranta anĝelo: „Mian respekton! sinjoro kolonelo", li salutis min kun antaŭrevolucia ĝentileco, „bonvolu eniri". Unu momenton mi hezitis ekmemorinte, ke mi havas nek dokumentojn nek envojaĝan permeson nek monon.

„Bonvolu enveni", ripetis la anĝelo, diveninte mian penson, „ĉe ni oni ne tedas sin reciproke per tiaj bagateloj kaj ĉio estas senpaga", li aldonis kun dolĉa, iom moka rideto.

Kvankam agrable surprizita, mi tamen ankaŭ pri ĉi tio ne miris, trovinte la aranĝaĵon ne pli ol ĝusta por modela institucio, kia devas esti paradizo.

„Sed nun permesu", daŭrigis la anĝelo, „ke mi transdonu vin al mia kolego, ĉar mi devas resti ĉe la pordego, anstataŭante Sanktan Petron, kiu ĵus retiriĝis por kelkaj momentoj."

„Nu", mi pensis, „tute prave, ĉar tia laciga ofico necesigas posttagmanĝan dormeton."

„Mian respekton, sinjoro kolonelo," salutis la dua anĝelo kun egala ĝentileco kiel la unua, kio pruvis al mi, ke en la ĉielo regas ankoraŭ iom da disciplino. „Bonvolu sekvi min," li invitis kun afabla rideto: „La Majstro jam atendas." —

„Ĉu—la—Ma—majstro?" mi ekbalbutis konfuzite, kaj nefidante miajn orelojn mi demandis: „Kiu majstro?"

„Majstro Zamenhof kompreneble," ripetis gajigite mia gvidanto.

Kiel dirite, pri nenio mi ĝis nun estis mirinta, eĉ ne pri la min ĉirkaŭantaj belegajoj de l' paradizo, kvankam ili estis tiel grandiozaj, ke homa fantazio ne povus imagi ion similan; sed nun mi ekmiregis ĝis senparoliĝo. Ne pro la tute per si mem komprenebla fakto, ke la Majstro estas ĉi tie, sed pro tio, ke li atendas min, min, tian maleminentulon, kiun li dum sia vivo eĉ ne konis persone. — „Kaj kie li estas?" mi plue demandis, apenaŭ reakirinte la parolkapablon. „En la kinematplastikofonografo, ien en la blanka pavilono antaŭ ni," respondis la anĝelo, kaj rimarkinte ke mi denove miras, li aldonis: „Tie li ĉiam observadas, kio la antaŭan tagon okazis en Esperantujo." Post ĉi tio la aminda, flugilhava ĉielulo flankenŝovis la pordokurtenon, diris respektplene: „Bonvolu eniri, sinjoro kolonelo," salutis militiste kaj malaperis.

Kun bateganta koro mi transpaŝis la ŝojlon kaj ekvidis la Majstron.

„Estu bonveninta, kara samideano," eksonis dolĉa, harmonia voĉo, en kiu vibris la tuta animo de ĉi tiu nobla homamanto, kaj li mem proksimiĝis kun etenditaj ambaŭ manoj. La amoplenaj rigardoj de liaj mildaj okuloj fiksiĝis sur mia vizaĝo kaj penetris profunden en mian koron, plenigante ĝin per nedirebla ĝojo. Ĉia ekscito kaj embaraso tuj foriĝis.

„Ho, kara Majstro," mi ekparolis. „Kiu honoro por mi, malindulo" — sed li ne lasis min daŭrigi. — „Ne tro humiligu vin," li diris. „Mi konas vin tre bone kaj ŝatas vin, verdire ne tiom pro viaj tradukoj kaj versaĵoj — la Sankta Dio ja pardonas ĉion — sed ĉefe pro via fervora, varma pledado por kategorio de homoj, kiuj ankaŭ al mia koro estas karegaj."

Tion dirinte, la Majstro kondukis min en la ludejon. Mi sidiĝis; la aparato ekfunkciis — kaj mi havis la trian fojon depost mia alveno en la paradizo la kaŭzon ekmiregi, ĉar mi travivis la saman okazintaĵon, kiun mi estis travivinta hieraŭ, nome la unike belan koncerton de la geblinduloj en Purkersdorf. La mirakla aparato redonis ĉion kun tia fabela precizeco, ke ankaŭ la plej sensignifa detalo ne mankis. Estis la sama medio kun la samaj personoj, la samaj paroloj, la sama muziko, la samaj kantoj, ĉio estis la sama kiel hieraŭ, eĉ min mem mi vidis inter la granda amaso de l' aŭskultantoj.

La direktoro, salutinte la kunvenintaron per afablaj vortoj, paroladis tre interese pri la metodo kaj la celoj de la eduka laboro, ebligante per tio al multaj, la unuan fojon enrigardi sferon de homoj, pri kiuj la flanke starantaj havas nur tre malklaran ideon, nenion imagante pri ilia interna vivo, pri ilia ne satigebla sopiro al la klereco, kaj al ĉio bela kaj bona, fine pri ilia diligenteco, kapabloj kaj talentoj, kiuj plene raltigas ilin al la postulo, esti konsiderataj ne kiel nuraj objektoj de la prizorgiteco kaj publika kompatemo, sed kiel egalvaloraj membroj de l' homa societo.

Kaj nun sekvis la koncerto. Ho, kiel belega ĝi estis, kiel virtuozaj la orgen- kaj forteplanludoj! Sed ĉion superis la kantado.

Ĉu vi iam aŭskultis kanton de blinda najtingalo? Oni diras, ke ĉi tiu kara kreaĵo kun ĉiu tono de sia dolĉa voĉo fordonas ereton de la propra animo. Similan impreson estigis la kantado de ĉi tiuj junaj senlumuloj. Ankaŭ en iliaj voĉoj kunsonas io, kio ne eliras nur el la gorĝo, sed venas rekte el la plejinterno de l' koro.

Profunde tuŝitaj, ĉiuj spiritretene aŭskultadis kaj eĉ en la okuloj de la ĉeestantaj anĝeloj brilis larmoj de emocio. La Esperantokantoj kaj precipe la himno okazigis veran ekstazon de ĝojo kaj admiro, kaj preskaŭ nefinonta aplaŭdego rekompencis la prezentintojn.

Ĉio estis malaperinta. Apud mi staris nur la Majstro. Ekpreninte mian manon, li diris per voĉo anĝele milda, sed firma kaj konvinka: „Jen la regiono la plej grava por nia movado! Ĉar nenie la kampo por nia ideo estas pli akceptema, nenie ĝenerala interkomprenilo pli bezonata ol inter homoj, kiujn pro komuna sorto ligas tiom da komunaj interesoj.

Mi do petas vin, kara amiko, reveninte al la tero, prediku skribe kaj parole ĉi tiun verajon laŭ la tuta al vi dispona elokventeco, kaj instigu nian samideanaron proksimiĝi al la blinduloj kiel eble plej ofte, lerni la reliefan skribon, kopii Esperantolibrojn, aliĝi kiel subtenantaj membroj al la porblindulaj unuiĝoj, resume, helpi al tiuj bravaj gehomoj ĉiurilate kaj ĉiupove, por ke ili helpu al nia Esperanto konkeri la mondon." — „Amen!" mi diris — — kaj vekiĝis. —

„Ĉu vi bone dormis post via hieraŭa ekskurso al Purkersdorf?" demandis min la edzino, karesante mian frunton. „Ŝajne vi ankoraŭ ne finsonĝis, ĉar via mieno radias kaj viaj okuloj brilas, kvazaŭ vi estus spertinta ian superteran feliĉon."

„Jes, karulino, hodiaŭ nokte mi estis en paradizo kaj tie mi parolis kun la Majstro."

Franz Zwach.

Pagante vian novan abonon al ET, ne forgesu aldoni malgrandan sumeton por „Esperanta Ligilo“!

Sur la Maro.

I.

Sonĝas la Maro.

Sonĝas la maro, silente dormanta,
sonĝas pri paco post uragan'
Ondo post ondo, en rondo vaganta,
pelas la ŝipon sur ocean'.
Sur la ferdeko, en larma medito,
sonĝas pri paco mia anim';
sed la suferoj de l' sanga milito
premas ĝin peze sen ĝoja fin'

Super la kapo senfina kupolo,
sube senfunda mara mister'
Inter ĉi limoj vagadas en solo,
kiel la mevo, mi sen esper'.
Landon de longa militkaptiteco
mejloj post mejl' disigas de mi,
kie la jaroj de l' bela juneco
pasis de mi en melankoli'

Estas for ĝojo de dolĉa revido;
ĉar en kortimon dronas ĝi sin.
Lipojn kurbigas la plor', ne la rido;
ĉar restis tie mia anim'.
Kaj antaŭsento min premas kruele
pri la vaneco de la reven';
ĉar rekomenci vivon — sencele,
vivi sen amo, sen ĉirkaŭpren'

Ve! Ho milfoje ve al mi revanta,
kiu dufoje sonĝis en viv'!
Kaj ve al koro, en brusto batanta,
kiun venenis marĉa lesiv'!
Ridon kaj larmojn heredis mi nure
el la edeno de l' pra-Adam':
ridon forviŝis la vivo, — terure,
restis nur larmoj pro vana am' .!

[Singapur.]

II.

La Mar' furiozas.

La mar' furiozas:
batale ond' iras al ond'
La mev' krie krozas;
en tima trem' veas la ĝem'
. . . . . .
Ventvip' de l' uragano
la lipojn de l' ŝipanoj
malfermas je plorpia preĝ'.
Mi sola sur ferdeko
admiras en ĉi bleko
koleron de la mara reĝ'
Krom
fantom'
de l' maro
la ondaro
ribelas kun bru'
por venĝanta detru'
Nun
la lun'
mortpale
al vandale
freneza taĉment'
de l' fulma element'
rigardas kun mieno
plena de sangabomeno
Ond'
post ond'
en danca rond'
zuma kaj brua
ĉe fulmotondro skua
jen sible susure ĝemas,
jen muĝe murmure blasfemas
kaj ĵetas sin al rip' de l' baraktanta ŝip'
por peli ĝin per puna fort', pacigi nin kun tera sort'
— en mort'!
. . . . . .
Miraklo! . Vin mi vidas
ĉe fulma lum' de l' brua zum'
Kun muta rav' Vi sidas
en danca rond' de l' ŝaŭma ond'
. . . . . .
Kaj el profund' de l' maro,
tra zumo de l' ondaro
nun sonas dolĉa am-riproĉ'.
Min logas al haveno
de ama ĉirkaŭpreno
por lasta kiso — Via voĉ'

[Kolombo-Cejlon] *Julio Baghy.*

* * *

(Rim. de Red.: Julio Baghy estas unu el niaj plej bonaj, eble nia plej bona nuntempa originala poeto. Atentu la majstrecon, per kiu li ludas kun versoj kaj rimoj, precipe en la II-a parto de ĉi-supra poemo, kie li kvazaŭ-pentras la bruon de l' maro, la alproksimiĝon, ŝveliĝon kaj subitan kreviĝon de l' ondoj. La poemo estas verkita dum hejmveturo de l' poeto el siberia militkaptiteco.)

La nemortanta flamo.

La folioj falis teren,
Nuda staras la arbaro,
Kaj al suda lando migris
La gajega kantbirdaro.

Vento estas nun kantisto,
La kamparojn trabruante,
Kantas pri sovaĝa forto,
Per la nuboj pilkludante.

Nuboj kaj nebuloj naĝas
Super nia bela tero,
De l' printempa sunbrileco
Ne plu restas ia ero.

Ĝojo ŝajnas estingita,
Ne plu fluas lumofontoj,
Griza estas la ĉielo,
Grizaj ankaŭ val' kaj montoj.

Nur en mia koro flamas
la nemortanta lumo,
De la travivitaj ĝojoj
Estas ĝi restanta sumo.

Ĝi memoras pri beleco
De l' printempo kaj somero,
Pri la milda ventblovado
Kaj la florkovrita tero.

Kaj ĝi ankaŭ certe scias,
Ke post vintro plej malvarma
Revekiĝos nova vivo,
Nova majo, bela ĉarma.

Ankaŭ vivovintro venos,
Kunportonte la malĝojon;
Velkos ĉiuj belaj floroj,
Ornamintaj mian vojon.

Grizaj estas barb' kaj haroj,
Griza ankaŭ la humoro,
El la sento malaperos
Baldaŭ la juneca oro.

Sed la nemortanta flamo
Ankaŭ nun restados hela,
Ĝi memoros pri l' juneco,
Kiam ĉio gaja, bela.

Ĝi memoros ĉiujn horojn,
Kiam la feliĉo floris,
Kiam la serenaj himnoj
El la gaja brust' sonoris.

Kaj ĝi ankaŭ certe scias:
Se finiĝos mia rondo,
Ekkomencos nova vivo
En pli bela alta mondo.

Jes, en mia koro lumas
la nemortanta flamo;
Nemortanta, ĉar ĝi estas
Ero de l' eterna Amo.

Eduard Jerke
(blinda samideano).

Hejmsopirado.

Sola ofte mi jam iris
Tra floranta la arbaro,
Ĝeme pensis kaj sopiris
Mi pri l' hejmo ĉe la maro,
Kiun iam mi forlasis
Kun malĝojo en la koro.
Kvankam multaj jaroj pasis,
Restos ĉiam la memoro
Pri la hejmo kara mia,
Kiun multe amas mi,
Ĉar en fremda lando ĉia
Ne feliĉa estas mi.

Mi sopiras la revidon
De la hejma valo bela,
Kie sonas gaja rido
Kaj la suno brilas hela,
Kie mi kiel infano
Ĝoje vivis ĉe l' frataro,
Kaj volonte mi la manon
Premus al la amikaro.
Ho, dezirus mi revidi
Mian karan patrolandon
Kaj mi volus ree sidi
Ĉe la bela mara rando.

Sed ne estos plenumata
De la koro la sopiro
Kaj ne vidos mi l' amatan
Vin, ho valon, kun admiro,
Ĉar la sorto min migrigas
Senripoze tra l' fremdlando,
Kaj nenio feliĉigas
Min kiel la hejmolando,
Ne la lando fremda donis
al mi ĝojon veran tian,
Kiel ĝin al mi proponis
Kara hejmolando mia.

Karaj birdoj, vian kanton
Ofte aŭdis mi kun ĝojo,
Vi salutu hejmolandon
Mian sur la migrovojo,
Ĉiutage, ĉiuhore
Je l' unua la tagiĝo,
Mi salutas Vin tutkore
Ĝis malhela vesperiĝo.
Kiam estos mi mortanta
Kaj ripozos korpo laca,
El la lipoj eliranta
Estos hejmsaluto lasta.

J. Kreitz
(blinda samideano).

La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimir Korolenko.

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio.

Tradukis laŭ la 5-a rusa eldono kun permeso de la aŭtoro

Maria Ŝidlóvskaja.

(46-a daŭrigo.)

Je la sama tempo apud malfermita flanka pordo de la vagono haltis du viroj, kaj aŭdiĝis ruslingva parolado.

„Aŭskultu, Eŭgeno!“ diris unu per alta tenoro. „Ankoraŭ unu fojon mi ripetas: restu kun ni!“

„Ne, mi ne povas,“ respondis juna baritonulo. „Io min allogas . Ĉu vi komprenas? Tiuj lastaj sciigoj . .“

„La sama iluzio, kiel ĝis nun! Kaj pro tiaj fantaziajoj vi forrifuzas al vi vere bonan, vivan taskon: Doni novan patrujon al miloj da homoj, fari interesan socian eksperimenton .“

„Vi estas prava. Ĉe aliaj cirkonstancoj mi . Sed mi ripetas: nun io min allogas . . Kaj por paroli pri fantaziajoj, Samuelo, — unue — el tiaj fantaziajoj ja konsistas la vivo ‚de l'estonteco‘. Due — vi mem kun via entrepreno .“

„Ĉio preta!“ oni kriis angle sur la perono. „Volu envagoniĝi!“ aŭdiĝis la invito de la konduktoroj: La du amikoj forte sin ĉirkaŭbrakis, kaj unu el ili ensaltis la vagonon, jam ekmoviĝantan.

Li estis altkreska ankoraŭ juna viro kun malregulaj sed imponantaj vizaĝtrajtoj, en ŝuoj kaj vestoj polvokovritaj, kvazaŭ en la lasta tago li estus piedirinta grandan distancon. Li metis sian malgrandan paketon sur breton super la kapo de Mateo, kaj lia rigardo haltis sur la vizaĝo de la dormanto. En la sama momento Mateo, eble sub influo de tiu rigardo, malfermis siajn bluajn okulojn, dormemajn kaj malgajajn. Dum kelkaj sekundoj ili rigardadis sin reciproke. Poste la kapo de Mateo refalis malantaŭen, kaj el lia larĝa brusto elŝiriĝis profunda ekĝemo Li jam ree dormis

La alveninto ankoraŭ dum kelke da sekundoj observis lian vizaĝon . Kvankam Mateo estis alivestita kaj glate razita, kvankam li surhavis amerikan jakon kaj ĉapelon, lia figuro tamen vekis iun rememoron pri la malproksima patrujo. La juna viro tuj rememoris ebenaĵon, kovritan de profunda mola neĝo, tintadon de sonorileto de ĉevala jungaĵo, altan pinarbaron flanke de ŝoseo kaj bluokulajn homojn, kiuj flanken direktas siajn glitveturilojn antaŭ galopanta ĉevaltrio ,

Eble Mateo ankaŭ sonĝis ion samspecan. Liaj lipoj moviĝis kaj balbutis ion, lia vizaĝo esprimis humilan peton

La grizhara sinjoro en cilindro observadis la tutan mutan scenon per siaj linkaj okuloj, esprimantaj ian ironian bonkorecon.

„Bonan vesperon, s-ro Nilov,“ li diris, vidante, ke la ruso lin ne rimarkas.

Tiu ektremetis kaj rapide sin turnis.

„Ha! Bonan vesperon, s-ro juĝisto Dikinson,“ li diris en pura angla lingvo, etendante al la juĝisto sian manon. „Pardonu, ke mi vin ne tuj rimarkis!“

„Ne grave! Vi ekinteresiĝis pri ĉi tiu pasaĝero? Min li ankaŭ interesas. Videble, li vojaĝas el malproksime .“

„El Milwaukee,“ diris alia pasaĝero.

„Ho, ne,“ enmetis la alia. „Mi envagoniĝis en Milwaukee, sed lin mi jam trovis en la vagono. Ŝajne, li venas el Chicago, eble eĉ el Nov-Jorko. Li ne parolas eĉ unu vorton angle kaj estas senhelpa kiel infano.“

„Evidente, alilandulo,“ diris la juĝisto, observante Mateon per esploranta, plenatenta rigardo. „Vera atleto! — Vi, s-ro Nilov, ŝajne vizitis viajn samlandanojn? Kiel iras ilia afero? Mi ĵus vidis, ili aĉetis al si bonegajn maŝinojn de la plej bona amerika firmo.“

„Jes . ĝis nun ne facila estis ilia vivado, sed ili esperas . .“

„Ĉu vi legis la eltiraĵon el la lasta raporto de la elmigrada komitato? La cifero de elmigrantoj el Rusujo kreskas.“

„Jes,“ mallonge jesis Nilov.

„Ĉu vi legis ankoraŭ en la sama numero de la ‚Kuriero de Debltown‘ daŭrigon de la historio de tiu Nov-Jorka sovaĝulo? Oni certiĝis, ke li ankaŭ estas ruso.“

„Tiaokaze, sinjoro, li ne estas sovaĝulo,“ sektone diris Nilov.

„Hm jes . Pardonu, s-ro Nilov. Mi sendube ne parolas pri la civilizita parto de la nacio Sed . ĝis la grado tamen homo, kiu mordas .“

„Sendube, li ne mordis, sinjoro. Ne ĉiuj gazetaj sciigaĵoj ja estas veraj.“

„Tamen Lia konduto kontraŭ policano Hopkins

„La policano, kiel diras la gazetoj, la unua frapis lian kapon per bastono Ĉu vi lin ankaŭ alkalkulas al sovaĝuloj?“

La grizhara sinjoro diris ridante:

„Ho! Sed tio ja estas tute alia afero. La policanoj en nia lando estas armitaj per bastonoj por eventuala uzado . Kaj kiam alilandulo rompas la ordon . . .“

„Kun granda bedaŭro mi tion aŭdas el la buŝo de juĝisto,“ diris Nilov malvarme.

La grizhara sinjoro rektiĝis, videble iom ofendite kaj diris:

„Al la juĝisto Dikinson neniu ankoraŭ riproĉis senpripensan juĝadon . . en lia juĝejo . . Nun ni havas antaŭ ni faktojn, kiel ilin raportas gazetoj . Ĉu mi eble vin ofendis per io, s-ro Nilov?“

„Vi min ne ofendis. Sed se vi konas la policanojn de via lando, mi ankaŭ konas la homojn de mia patrujo. Kaj mi opinias ofenda sensencaĵo la gazetan babilaĵon pri ili, kvazaŭ ili mordus! Ĉu vi estas tute certa, ke viaj policanoj ne trouzas siajn bastonojn?“

La juĝisto elprenis la cigaron el la buŝo kaj dum kelke da tempo rigardis sian najbaron, kvazaŭ mirante pri la neatendita turniĝo de la interparolado.

„Hm . . jes . .,“ li diris. „Konsiderante la aferon de tia vidpunkto . Laŭkonscience, mi tute ne povas esti certa pri tio . . Kaj se tia afero estus de mi juĝata, mi postulus de tiu Hopkins precizajn klarigojn. Ho jes, mi postulus klarigojn, sinjoro! Videble, vi havas iun ideon pri la tuta okazintaĵo?“

„Jes, mi havas ideon. Al mi ŝajnas, ke mia samlandano ĉeestis la meeting'on tute okaze. Kaj tute okaze li kunpuŝiĝis kun s-ro Hopkins.“

„Sed por kio do li sin klinis kaj penis kapti lin . . .? Hm, unuvorte, — kiel raportas la gazetoj . .“

„Estas, kredeble, vero, ke li sin klinis. Bedaŭrinde, sinjoro, en mia hejmlando homoj iafoje sin klinas salute tro profunde.“

„Ĉu vi opinias? Ha, tio ŝajnas al mi nekredebla! La intenco mordi kaj mordi ĝuste la manon . Ĝi postulas almenaŭ pruvon . .“

„Sed se la salutan kliniĝon sekvis bona frapo sur la kapon?“

„Ha, ha! Tio certe mallumigas prudenton kaj liberigas pasiojn! Absolute, sinjoro, la afero nun ŝajnas al mi preskaŭ klarigita. Vi estus bonega advokato! Ho jes! Vi povus fariĝi la plej bona advokato de nia urbo . . Se vi tamen preferas labori en mia arbosegejo . .“

Li forŝutis cindron de sia cigaro kaj fiksis sur la vizaĝon de Nilov siajn vivecajn akrajn okulojn. Poste, ĵetinte rigardeton sur la aliaj pasaĝeroj por certiĝi, ke oni ilin ne aŭskultas, li sidiĝis por doni pli da intimeco al la interparolo sur la benkon de Nilov, metis sian manon sur lian genuon kaj diris per mallaŭtigita voĉo:

„Bonvolu min senkulpigi, s-ro Nilov! Dik Dikinson estas homo scivolema . . Ĉu vi permesos, ke mi faru al vi kelkajn demandojn de eble iom intima speco?“

„Mi petas, sinjoro. Se viaj demandoj ŝajnos al mi ĝenantaj, mi ne respondos.“

„Ho, jes, sinjoro Nilov, kompreneble,“ ridis Dikinson. „Jen kio, sinjoro: vi estas la tria rusa sinjoro, kiun mi renkontas. Bonvolu diri: ĉu multajn amerikanojn vi vidis en via patrolando?“

„Mi renkontis kelkajn, — ne multajn.“

„Verŝajne, ili ĉe vi ŝanĝis sian kutiman profesion por pli bonaj viokondiĉoj? Ĉu ne vere?“

„Ŝajne jes.“

„Jes. Eble mi eraras, sed . . . Ŝajnas al mi, ke vi mem, sinjoro, — ĉu vi ne faris la malon? Ĉi tie vi jam multfoje havis okazon demeti vian laboristan bluzon kaj fari karieron.“

Nilov ĵetis rigardon sur la kostumon de la maljuna sinjoro kaj respondis kun rideto:

„Mi vidas hodiaŭ sur vi, s-ro juĝisto, vian laboristan kostumon!“

„Ho, tio estas iom malsama afero!“ respondis Dikinson. „Jes, mi estis antaŭe masonisto. Kaj mi juris surhavi masonistan kostumon en ĉiuj solenaj okazoj.

Hodiaŭ mi ĉeestis la malfermon de l'banko en N. Mi estis invitita de la fondintaro. Sed kiu invitas s-ron Dik Dikinson, tiu invitas lian malnovan kostumon. Ĉiuj scias tion.“

„Mi tre respektas vian kutimon,“ serioze diris Nilov. „Sed —“

„Sed mi ripetas, tio estas tute alia afero. Mi surmetas la malnovan kostumon kaj plej bonajn gantojn el Nov-Jorko. Tio memorigas al mi, kiu mi estis kaj kiu mi nun estas, t. e. kiom mi ŝuldas al mia malnova kostumo. Tio estas mia estinteco kompare kun mia estanteco.“

(Daŭrigota.)

Pagante la jarkotizon por 1922 al via Grupo, alpagu 10 procentojn aŭ pli por „Esperanta Ligilo“!